

Kongresa Libro

大会案内書



第 100 回日本エスペラント大会

**Esperanto ligas homajn korojn
--- de la pli ol 100-jara historio al estonteco**

人の心をつなぐことばエスペラント—100 余年の歩みから未来へ

2013-10-12, 13, 14, 15

Turo-Halo Funabori, Kvartalo Edogawa, Tokio タワーホール船堀（東京都江戸川区）

Organizantoj, aŭspiciantoj

Organizantoj:

Japana Esperanto-Instituto
Ok-Esperanto-Grupoj en Tokio

Aŭspiciantoj:

La Ministerio pri Edukado kaj Scienco
Japana Komisiono por UNESKO
La gubernio Tokio
La kvartalo Edogawa
Eduka Komitato de la kvartalo Edogawa
La Japana Internacia Fonduso
Nacia Federacio de UNESKO-Asocioj en Japanio
La Japana PEN-Klubo
La ĵurnalo Asahi, Ĉefsidejo de Tokio
La ĵurnalo Mainichi
La Novaj-agentejo Kyodo Tsushin

主権:

一般財団法人日本エスペラント協会
都区内エスペラント会連絡会

後援:

文部科学省
日本ユネスコ国内委員会
東京都
江戸川区
江戸川区教育委員会
独立行政法人国際交流基金
公益社団法人日本ユネスコ協会連盟
一般社団法人日本ペンクラブ
朝日新聞東京本社
毎日新聞社
株式会社共同通信社

Kongresa Libro
de la 100-a Japana Esperanto-Kongreso
Eldonis: Loka Kongresa Komitato
de la 100-a Japana Esperanto-Kongreso
Redaktis: Hori Jasuo, Inumaru Fumio,
Isikawa Tiekō, Isino Yosio (ĉefredaktanto),
Sibayama Zyun'iti, Suzuki Keiichiro,
Enpaĝigis: Fujimori Kohej
Simbolan markon desegnis: Yajima Hiroshi

第100回日本エスペラント大会 大会案内書
発行者: 第100回日本エスペラント大会
実行委員会
編集者: 堀泰雄、犬丸文雄、
石川智恵子、石野良夫 (編集長)、
柴山純一、鈴木恵一朗
版下作成: 藤森耕平
シンボルマークデザイン: 谷島博

Enhavo

1. Organizantoj, aŭspiciantoj	
2. Enhavo	1
3. Salutoj	
3.1. Saluto de la prezidanto de la kongreso	2
3.2. Saluto de la prezidanto de Loka Kongresa Komitato	3
4. Gratulaj vortoj	
4.1. Gratulaj vortoj de la guberniestro de Tokio	4
4.2. Gratulaj vortoj de la kvartalestro de Edogawa	5
4.3. Salutmesaĝo de la Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio (UEA)	7
5. Invititoj de JEI kaj aliaj, kiujn japanaj esperantistoj helpis akiri vizon ktp.	8
6. Loka Kongresa Komitato (LKK) kaj kunlaborantoj	8
7. La kongresejo	10
8. Kongresaj ĉambroj	13
9. Lunĉo, Foto kaj Libroservo	15
10. Program-tabelo	16
11. Klarigo pri la programeroj	
11.1. Laŭtaga programo kun klarigo	20
11.2. Bankedo	33
11.3. Publika Koncerto	34
11.4. Amika Vespero	35
11.5. Premio Ossaka	36
11.6. La literatura konkurso de JEI, 2013	36
11.7. Prelegoj	37
11.8. Ekspozicio en etaĝo 7	39
11.9. Ekskursanoj	40
12. Longdaŭraj membroj de Japana Esperanto-Instituto	41
13. Forpasintoj	42
14. Memorlibroj de la kongreso	43
15. Prezento de libroj	44
16. Memorpoŝtmarkoj, stampo	44
17. Regularo de la Japana Esperanto-Kongreso	45
18. Kiel kunvivi kun blinduloj / vid-handikapitoj	47
19. Nomlisto	
19.1. Aliĝintoj el Japanio	49
19.2. Aliĝintoj el alilandoj	60
19.3. Aliĝintoj el Japanio laŭ alfabeto	62
20. La Espero	71
21. La Tagiĝo	71

Saluto

SUZUKI Keiichiro

Prezidanto de la 100-a Japana Esperanto-Kongreso

Prezidanto de Japana Esperanto-Instituto

第 100 回日本エスペラント大会会長
一般財団法人日本エスペラント協会理事長
鈴木恵一朗



Karaj kongresanoj kaj gastoj, kiel la Kongresa Prezidanto, tre ĝoje mi salutas ĉe la malfermo de ĉi tiu memorinda 100-a Japana Esperanto-Kongreso. Mi elkore dankas vin ĉiujn pro via partopreno el diversaj lokoj. Precipe ĉi-foje ĉeestas pli ol 40 alilandaj esperantistoj el dek-kelkaj landoj, inkluzive de reprezentantoj de aziaj landoj kaj Universala Esperanto-Asocio. Ni, japana esperantistaro elkore bonvenigas vin ĉiujn.

En 1906 la 1-a Japana Esperanto-Kongreso okazis en Tokio. Post tiam, kvankam estis jaroj kiam la Japana Kongreso ne okazis, supervenkinte multe da malfacilaĵoj, preskaŭ ĉiujare la Japana Esperanto-Kongreso okazis diversloke enlande kaj en 2011 ankaŭ en Koreio kiel la Komuna Esperanto-Kongreso inter Japanio kaj Koreio. Kaj finfine ĉi-jare ĝi atingis la 100-fojan okazigon. Mi sincere esprimas grandegajn dankojn al antaŭuloj esperantistaj en Japanio pro ilia entuziasmo al nia lingvo kaj multe da klopodo por disvastigo de nia lingvo kunlabore kun esperantistoj en najbaraj landoj kaj la mondo. Dum la kongreso, rigardante la historion de la japana Esperanto-movado, ni faru perspektivon de estonteco de Esperanto kaj trovu starpunkton por evoluiĝo.

Por ĉi tiu kongreso ni preparis tre riĉajn programerojn por la ĝenerala publiko, senekzemplajn antaŭe. Ĉar la 100-a Kongreso devas esti la plej bona ŝanco por sciigi al publiko, kio estas Esperanto, kia estas Esperanto, kaj kiel oni utiligas la vivantan lingvon. Mi ege deziras, ke multe da ne-esperantistoj pleniĝas en ĉiuj haloj por publikaj programeroj.

Ĉiuj ĉeestu multifacetajn programerojn, kunligiĝu kore unu la alian, kaj havu signifoplenan kaj ĝojan tempon dum tiuj ĉi 4 kongresaj tagoj. Vivu la 100-a Japana Esperanto-Kongreso!

Saluto

ISIKAWA Tiekō

Prezidanto de LKK de la 100-a Japana Esperanto-Kongreso

第 100 回日本エスペラント大会実行委員長
石川智恵子



Karaj kongresanoj kaj gastoj!

Bonvenon al la centa Japana Esperanto-Kongreso en Tokio! Ni tre ĝojas, ke kolektiĝas en tiu ĉi halo tiom multe da homoj, ne nur el la tuta Japanio sed ankaŭ el dek kelkaj landoj en la mondo.

Japana Esperanto-Kongreso jam tridek tri fojojn okazis en Tokio, kaj la lasta, nome la 81-a Japana Esperanto-Kongreso okazis en 1994. Kaj hodiaŭ, Tokio gastigas la jubilean kaj historie signifoplenan centan japanan kongreson, kion ni tre fieras.

Ĉi-kongreso, nekutima kvartaga aranĝo, pleniĝas de multaj publikaj programeroj. Por kontentigi ne nur la kongresanojn sed ankaŭ la publikon, esperantistoj en metropola regiono kaj la membroj de ok tokiaj Esperanto-grupoj fondis lokan kongresan komitaton kaj preparlaboris unuanime. Ni pensas tion grava, ke okaze de tiu ĉi granda evento ni diskonigu Esperanton al la publiko, kaj ke homoj havu ŝancon renkonti Esperanton.

La kongresa temo estas: Esperanto ligas homajn korojn --- de la pli ol 100-jara historio al estonteco. Unu el niaj ĉefaj programeroj estas prelegaro de tri fakuloj kun la temo “Esperanto en Japanio, Japanio en la Esperanto-movado; lerni de historio por estontaj perspektivoj”. Ni esperas, ke ĝi interesos vin, kaj ke ĝi donos al ni la okazon pensi pri la nuno kaj estonto de Esperanto. Ni ankaŭ esperas, ke vi ĝuu publikan koncerton kun esperantistoj-muzikistoj kaj aliajn diversajn programerojn dum tiuj kvar tagoj.

Nome de la Loka Kongresa Komitato de la 100-a Japana Esperanto-Kongreso, mi elkore dankas vin ĉiujn, aŭ ĉeestantaj ĉi tie aŭ forestantaj fizike sed morale estantaj kun ni, pro via partopreno al la 100-a Japana Esperanto-Kongreso en Tokio.

Gratulaj vortoj

Inose Naoki
Guberniestro de Tokio

東京都知事
猪瀬直樹



Karaj kongresanoj,

Mi gratulas vin pro la grandioza okazigo de la jubilea 100-a Japana Esperanto-Kongreso en la gubernio Tokio. Mi elkore bonvenigas vin ĉiujn, kiuj venis de diversaj lokoj, kaj japanaj kaj fore eksterlandaj. Mi admiras, ke Esperanto estas pli ol cent jarojn uzata de la mondaj subtenantoj, kaj ke ĝi kontribuadas al pli viglaj internaciaj interŝanĝoj, estante lingvo komuna trans ŝtataj aŭ naciaj limoj. Mi esprimas profundan respekton al la klopodo de vi koncernataj. En Tokio, unu el la monde plej grandaj urboj, vivas ĉirkaŭ 400 mil alilandanoj; kaj ĝi ĉiujare akceptas ĉirkaŭ 4, 1 milionojn da turistoj tutglobaj. Tiel ĝi nun estas urbo internacia, kun homoj el plej diversaj landoj kaj regionoj. Nu, ni celas koncentri en Tokion, administrajn kaj esplorajn stabejojn el Azio, kaj por tio ni starigis "Specialan Zonon por Aziaj Ĉefsidejoj", nome novan projekton por inviti eksterlandajn entreprenojn, kaj tiel estigi komercan nodon en Azio. Mi esperas, ke vi, hodiaŭ ĉeestantaj, sentos la energion de Tokio, la urbo internacia, kaj per ĝi faros fruktodona tiun ĉi kongreson, kaj ke vi plue kontribuos al internaciaj kompreniĝoj kaj amikiĝoj en estonteco. En la fino mi deziras plian prosperon al Japana Esperanto-Instituto, kaj bonan faron al ĉiuj partoprenantoj!

第 100 回 という大きな節目を迎える日本エスペラント大会が、東京都で盛大に開催されることをお喜び申し上げます。

また、全国各地及び遠く海外からお越しく下さいました皆様方を心より歓迎いたします。

エスペラント語が、一世紀以上に渡り、世界各地の支持者によって使われ、国籍や民族を超えた共通語として、国際交流の促進に貢献していることは大変素晴らしいことであり、関係者の皆様方の御尽力に深く敬意を表します。

世界有数の大都市である東京は、現在、約 40 万人の外国籍の方が生活し、世界中から年間約 410 万人の観光客を受け入れるなど、数多くの国や地域の人が行き交う国際都市となっています。

また、現在、都では、アジア地域の業務統括・研究開発拠点の集積を目指し、新たな外国企業誘致プロジェクトを実施する「アジアヘッドクォーター特区」を立ち上げ、アジアにおけるビジネスの拠点となるべく、取組を進めているところです。

本日、御参集の皆様におかれましては、この国際都市・東京のエネルギーを感じていただきながら、本大会を実りあるものとしていただくとともに、今後とも、より一層の国際理解、国際交流に貢献されることを期待しております。

結びに、日本エスペラント協会の益々の御発展並びに参加された皆様の御健勝をお祈り申し上げます。お祝いの言葉といたします。

Gratulaj vortoj

Tada Masami

Kvartalestro de Edogawa



江戸川区長

多田正見

Karaj kongresanoj,

Mi gratulas vin pro la jubilea 100-a Japana Esperanto-Kongreso, okazanta en tiu ĉi kvartalo Edogawa. Mi elkore bonvenigas vin, partoprenantajn el Japanio kaj el eksteraj landoj, kunvenantajn en nian kvartalon.

Nia kvartalo Edogawa situas en la ekstrema oriento de la metropolo Tokio, frontas al la Golfo de Tokio, kaj formas urbon kun 670 mil loĝantoj. Kaj la urbo riĉas je akvo kaj verdo. Per kompletigo de kloaksistemo ni elservigis riveretojn el funkcio de kloako kaj revivigis ilin kiel ĉe-akvajn parkojn por ĝui medion ĉirkaŭ akvo. Ni konstruis ankaŭ preter-kanalajn vojojn sub verdaĵoj por amikiĝi kun akvo. Tiel nia urbo proksimigas homojn al naturo malgraŭ ties urbaj trajtoj.

Nia kvartalo Edogawa havas la plej altan proporcion de junuloj malpli ol 15 jarojn aĝaj, inter la 23 kvartaloj de la gubernio Tokio. Tial la kvartalo plenplenas de energio, kiun eligas la juna generacio. En nia kvartalo loĝas tiom multaj ne-japanoj, pli ol 22 mil el 93 landoj. Inter ili estas 2 mil hindoj, nome unu el dek hindoj en la tuta Japanio. Ĉiun aŭtunon ni havas Feston de Divali, por interamikiĝi kun la hindaj loĝantoj. Jaron post jaro, loĝas pli da alinacianoj en nia kvartalo, kaj tial ni plene konscias, ke unu el la solvendaj aferoj estas kunflorado de diversaj

このたび、記念すべき第100回日本エスペラント大会が、江戸川区で開催されますことをお慶び申し上げます。また、国内外から江戸川区にお越しいただいた皆様、心から歓迎いたします。

ここ江戸川区は、首都東京の最東部に位置し、東京湾に面した、約67万人の人々が暮らす都市です。下水道の整備により目的を終えた河川を、水と親しめる公園としてよみがえらせた親水公園や、道路空間に「親水」の機能を持たせた親水緑道など、都会にあって自然と触れ合える、水と緑豊かなまちです。

そして、14歳以下の年少人口率が東京23区の中で最も高く、若い世代が生み出す溢れんばかりの活力が満ちています。

また、区内に暮らす外国人は93か国2万2千人を超え、とりわけインドの方は2千人と、日本に暮らすインド人の約10分の1がここ江戸川区に暮らしており、毎年秋にはディワリフェスタというインドの人々との交流のまつりも行われています。本区においても、年々地域に住む外国人が増加するなか、多文化共生は課題の一つであると認識しております。

特定の国や地域のことばではないエスペラントは、世界中で100万人を超える人々によって話され、中立な共通のことばとして、国際交流や異文化交流の促進に大きく貢献してきました。このような国際相互理解の促進を主旨とする本大会、第100回大会がここ江戸川区で開催されますこ

kulturoj.

Nu, Esperanto ne apartenas al iu specifa lando aŭ regiono, kaj ĝin parolas pli ol miliono da homoj tra la tuta mondo. Kiel neŭtrala kaj komuna lingvo, ĝi multe kontribuis al la akcelo de komuniĝo inter diversaj nacioj kaj kulturoj. Por mi estas tre signife kaj honorige, ke tiu ĉi centafoja kongreso, celanta akceli internacian interkomprenon, okazas en nia kvartalo Edogawa.

Mi aŭdis, ke tiu ĉi Kongreso preparas multajn publikajn programerojn, kaj tial supozas ke naskiĝos novaj esperantistoj ĉi tie. Mi esperas, ke vi, ĉiuj partoprenantoj interkonatiĝos reciproke pere de Esperanto, laŭ la kongresa temo "Esperanto ligas homajn korojn --- de la pli ol 100-jara historio al estonteco", kaj pasigos fruktodonan tempon en la kongreso.

Mi denove esprimas mian sinceran respekton al ĉiuj koncernatoj, kiuj ĝis nun klopodis por disvastigi Esperanton, kaj mi deziras al vi ĉiuj grandan sukceson de ĉi tiu kongreso, kaj pluan prosperon de Japana Esperanto-Instituto. Kaj mi nun finas mian saluton. Koran dankon.

とに、大変意義深く光栄に感じるものであります。

今回は、一般向けの特別プログラムも多数用意があるとのことですので、新しいエスペランティストも誕生することでしょう。大会テーマの「人をつなぐことばエスペラント～100 余年の歩みから未来へ」のとおり、本大会に参加される皆様がエスペラントによって繋がり、お互いの交流が深まる実りある大会になることをご期待申し上げます。

結びに、これまでエスペラントの普及にご尽力された関係者の方々に改めて敬意を表するとともに、本大会のご盛会と日本エスペラント協会の益々のご発展をお祈り申し上げ、お祝いのことばといたします。

Gratula mesaĝo

Mark Fettes

Prezidanto de UEA

世界エスペラント協会会長

マーク・フェテス



Karaj kongresanoj,

Kun emocio mi sidiĝis ĉe klavaro por verki ĉi tiun mesaĝon al via jubilea kongreso, ĉar la japana esperantistaro jam delonge perlaboris unikan lokon en la koroj de alilandaj esperantistoj.

Kio estas la sekreto de tiu rilato? Simple tio, ke japanoj tre konsekvence, tra la jardekoj, ne nur interesiĝis pri Esperanto, sed *uzadis* ĝin por plej diversaj kulturaj, sciencaj, politikaj, religiaj kaj aliaj celoj. Per tiuj tre diversaj agadoj, iu bela aromo de japaneco enfiltriĝis en la Esperantan kulturon, kaj profunde ĝojigis nin okcidentanojn, plifortigante nian fidon je la kapablo de Esperanto gastigi ĉiujn teranojn.

Ni alilandanoj ankaŭ ne forgesos, ke la disvolviĝo de Esperanto en Japanio okazis malgraŭ pluraj katastrofoj, iuj naturaj, iuj homfaritaj, ankoraŭ en la plej lasta tempo. Japanio gajnis nian amon; ĝi ankaŭ elvokas nian solidarecon. Ni esperantistoj pli bone ol multaj homoj komprenas, ke neniu lando estas plu insulo, aŭ insularo; ni ĉiuj estas partoj de la sama granda homa kontinento. Kiam Japanio suferas, ni ĉiuj suferas. Tial la Tago de Hiroŝimo, ekzemple, fariĝis por multaj esperantistoj okazo redediĉi nin al la progresigo de monda paco – tradicia movada celo, kiu tro ofte forgesiĝas inter la ĉiutagaĵoj de la Esperanta vivo.

En ĉi tiu centa japana kongreso, vi sendube festos la atingojn de via landa movado de la komenco ĝis nun. Tion ĝi ja meritas! Sed mi invitas vin ankaŭ kunpensi kaj kunplani energie pri la nuntempo kaj l' estonteco. La Strategia Laborplano de UEA proponas al vi prioritatajn agadojn por *konscii* homojn pri la ekzisto kaj valoro de Esperanto, por *kapabligi* ilin al la eleganta kaj trafa uzado de la lingvo, kaj por kulture evoluigi nian *komunumon*. Mi esperas ke vi atente konsideros tiujn prioritatojn, en kunlaboro kun ĉiuj kreaj fortoj de la movado. Adaptante tiujn principojn al la cirkonstancoj de ĉiu lando kaj regiono, ni povos porti Esperanton al tute nova nivelo de disvastiĝo kaj rekono.

Efektive ni vivas en epoko de transformiĝo, kiam nepras komenci pensi ne nur kiel homaranoj, sed ankaŭ kiel planedanoj. Se Esperanto ekhavas pli kernan lokon en tiu pensado (kiel ĝi ja meritas), tio certe okazos interalie pri la gravaj kontribuoj de la japana popolo. Pro tio mi envias vin pro via centa kongreso, kiu donas perfektan okazon por disvolvi la ne elĉerpeblajn inventemon, persistemon kaj kuraĝon, kiuj ebligis al Japanio brili en tiom da sferoj. Ĝi longe brilu plu, ankaŭ en la nia!